nia voĉo

madrida esperanto-liceo majo 2018

## PRELEGO PRI ESPERANTO KAJ LA CIVILA MILITO

Montriĝis tre sukcesa la prelego pri "Esperanto kaj esperantistoj dum la hispana interna milito", kiun la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prezentis en la Biblioteko Iván de Vargas de Madrido la 17-an de aprilo. Ĝin aŭskultis ĉirkaŭ kvindeko da ĉeestantoj, ĉefe de la organizanta asocio GEFREMA (*Grupo de Estudios del Frente de Madrid*), kaj ankaŭ esperantistoj kaj aliaj interesitoj. Post la prelego okazis rondo de demandoj. La prelego estos baldaŭ spektebla en la retejo de tiu asocio pri historiaj studoj.

## TAGO KAJ SEMAJNO DE LA LIBROJ

Iom malpli sukcesa estis la anoncita partopreno de MEL en la anoncita "Nokto de la Libroj", la 20-an de aprilo, ĉar ĝin ĉeestis nur esperantistoj. Post enkonduko de José A. del Barrio, kiel anoncite Miguel Fernández prezentis la 2-an eldonon de la libro "Miguel Hernández, poeto de l' popolo", eldonitan de Hispana Esperanto-Federacio, fine de la pasinta jaro. Ni krome organizis ekspozicion de libroj en Esperanto de la libroservoj de HEF kaj MEL.

La 24-an de aprilo ni denove partoprenis la tradician legadon de Don Quijote de La Mancha, en la *Círculo de Bellas Artes*, legante du pecojn en Esperanto. Ĉijare zorgis pri la legado Manolo kaj Isidoro, lernanto de la kurso en Fuenlabrada.



La 29-an de aprilo, sur la madrida placo Olavide okazis publika omaĝo al la hispana poeto Vicente Aleixandre, elstara membro de la t.n. *Generacio de 1927*, Nobel-premiito pri literaturo en 1977. La omaĝo konsistis en publika deklamo de poemoj ĉu de Aleixandre, ĉu de aliaj liaj samtempuloj. La organizantoj proponis al Miguel Fernández deklami ambaŭlingve (hispane-esperante) tiuspecan poemon. Li, kun du pliaj madridaj geesperantistoj, Águeda kaj Ricardo Biurrun, ĉeestis la aranĝon, kiun oni fine okazigis malgraŭ ĝena maloportuna pluvo, kiel videblas en la apuda foto. Ricardo kaj Miguel surpodiiĝis kaj deklamis poemon de Vicente Aleixandre. Ricardo, en la originala hispana, "Ven siempre, ven" kaj Miguel en ties esperantigo, "Venu ĉiam, venu". Kiel kutime, la publiko miris pri la beleco de Esperanto.

## MONATA LITERATURA VESPERO

En la literatura vespero kiun ni organizas ĉiumonate dum tiu ĉi jaro, la 21-an de majo ni organizos komunan laŭtlegadon kaj komentadon de rakonto de la fama esperanta verkistino Marjorie Boulton. Kiel kutime, je la 7a vespere.

## KONGRESOJ EN MADRIDO

Daŭras plu la organizado de la kongresoj okazontaj en Madrido fine de julio, t.e. 77a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 51a kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Jam aliĝis ĉ. 180 homoj, ĉu al unu el ili, ĉu al ambaŭ.

Kiel pretigo por la turisma flanko de la kongreso, grupo de esperantistoj de la organiza komitato partoprenis fine de aprilo gviditan viziton en la centraj stratoj de Madrido, por spertiĝi por la gvidado de la kongresanoj.

Krome, la Ministerio pri Kulturo de Hispanio havigis al HEF la rajton utiligi la emblemon de la Eŭropa Jaro pri Kultura Heredaĵo 2018, por la kongreso de ILEI, pro la ĉeftemo de tiu ĉi: "La Kultura Heredaĵo de E-o".

Vidu ĉiujn detalojn, kun aliĝilo kaj mendilo por servoj de la Kongresoj en la adreso: http://www.esperanto.es/kongreso/. Sekvu la novaĵojn en la sociaj retoj, en la kontoj specife kreitaj por tiuj eventoj; en Tŭitero: @madridakongreso kaj en Fejsbuko: https://www.facebook.com/madridakongreso/.

## ALIAJ RENKONTOJ EN HISPANIO

Dum la Internacia Junulara Kongreso, kiu ĉijare okazos komence de aŭgusto en Badaĥozo (Badajoz), oni organizas oficialajn ekzamenojn laŭ la KER-kadro. Ĉiuj interesitoj kontaktu kun la organizantoj, per la konto de HEJS: hejs@esperanto.es. Jam pli ol 150 junuloj kaj ne tiom junaj esperantistoj aliĝis al la renkonto.

La Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos en Salou inter la 29a de septembro kaj 6a de oktobro. Jam aliĝis pli ol 70 homoj, inter ili pluraj madridanoj. Pliaj informoj: http://esperanto-salou.blogspot.com.es/.

## GENERALA KUNVENO DE HEF

Hispana Esperanto-Federacio kunvokis siajn anojn partopreni Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, la 13-an de majo de 2018 (dimanĉe), je la 10:30 horo (je la 11:00 horo en dua alvoko), en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7, de Madrido.

## VIZITIS NIN

Kiel anoncite, José Mª Salguero (Kani) prelegis en la sidejo post sia reveno el la Mezorienta Kunveno en Marakeŝo, pri "Juan Goytisolo, transkultureco transĝibraltara" kaj rakontis pri tiu esperantista evento, en kiu li partoprenis kun nia samasociano Jaime Vinielles.

Pasigis du tagojn en Madrido la maroka samideano Munir, kiu renkontiĝis kun esperantistaj amikoj. Fine de aprilo kaj komence de majo troviĝas en Madrido la marsejla esperantisto Eĉjo, kiu partoprenis kaj partoprenos diversajn renkontojn.

## ĜOJIGA NOVAĴO

Al niaj amikoj kaj samasocianoj Félix kaj Mati naskiĝis bebo la pasintan 14an de aprilo, tagon elstaran pro diversaj datrevenoj, interalie la forpaso de Ludoviko Zamenhof. Li nomiĝas Luis, kaj bone kreskas kaj fartas. Gratulon al la paro!

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

La unuasabata renkontiĝo okazos la 5an de majo, ekde la 18:00 horo en la kafejo de la kulturejo Medialab Prado, str. Alameda 15, proksime al Paseo del Prado, apud Caixa Fórum.

Por esti informitaj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la forumojn en *Facebook* kaj *Meetup*.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com